

# Tagordo proponata por la Komitato de ILEI en Kopenhago

kun esperataj tempo-indikoj interkrampe, por ke ĉiu temo estu traktebla.

**Unua sesio** (Lunde, 18an de julio; 15.30 – 17.30h, salono D):

1. Malfermo kaj bonvenigo (5)
2. Konsistigo de la Komitato kaj Kvorumkontrolo (5)
3. Aprobo de la Tagordo, decido kiom da voĉoj rajtu unu komitatano (5)
4. Nomigo de protokolanto (5)
5. Konfirmo pri du retdecidoj (5)
6. Starigo de dumkonferencaj komisionoj: statuto, lerneja, universitata, alia? (15)
7. Jarraporto 2010, kune kun financoj 2010 (40)  
*La konkluda parto pri vizio traktiĝu sub "Estonta agado"*
8. Senŝarĝigo de la estraro por 2010. (5?)
9. Ektrakto de la Statutmodifoj. (35).

-----  
**Dua sesio:** (marde, la 19an de julio: 15.30 -17.30 h, salono D)

10. Honoraj membroj – du proponoj de la estraro (10)
11. Sekcioj. Decido ĉu eksigi la sekciojn en Britio, Irano kaj Rusio. (10)
12. Alvenintaj aliĝpetoj de sekcioj. (5?)
13. Raporto de la elekto-komisiono pri la serĉo de nova sekretario. (5)
14. Elekto de nova elekto-komisiono por la periodo 2011-2014. (10)
15. Rekonfirmo pri la pluekzisto kaj konsistigo de komisionoj. (15)
16. Nomigo de komisiito aŭ estrarano pri eksteraj rilatoj. (5)
17. Nomigo de nova redaktoro por Juna amiko ekde 2012 (5)
18. Nomigo de komisiito pri historio kaj Vikipedio. (5)
19. Starigo de laborteamo por ILEI en la UK. (10)
20. Estrara propono pri membrotizoj kaj abonoj por 2012. (20)  
*Se restas tempo, ni reiras al punkto 9 au pluiras al punkto 21. (20?)*

----- ĉefe merkrede okazos la kunsidoj de komisionoj -----

**Tria sesio:** (ĵaŭde, la 21an de julio: 10.00-13.00h, salono D)

21. Revizio de la Interna Regularo, parte laŭ la dumkonferenca Regulara Komisiono. (90)
22. Regularo por la Scienca Komitato pri IPR. (10)
23. Estonta agado. (80)
  - membro-varbado
  - sekca fortigo – ebloj por novaj sekcioj, reprezentantoj, kontaktpersonoj
  - aktivigo de la komitato kaj komisionoj
  - projekto 'esperanto125' (havos apartan prezenton en la konferenco)
  - strategio por la eksteraj rilatoj
  - planoj por la multlingva retejo – tradukreto.
  - perspektivoj trovi novajn, aktivajn agantojn (vidu liston de 30+ neplenumataj kampoj)
  - gvidlinioj por buĝeto 2012 – laŭgrada profesiigo de la laboro.
  - kaj multo pli.